

Leterujo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 580 1974.11.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Por ni fariĝis kutimo malfermi nian leterujon kaj respondi al niaj skribemaj geaŭdantoj, kiam sin anoncas la fino de la jaro. Depost nia lastjara babilado kun niaj geaŭdantoj, kiu efektiviĝis proksimume samdate, alvenis leteroj, poŝtkartoj, presaĵoj kaj registraĵoj el 19 landoj, tio estas el Aŭstralio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hispanio, Hungario, Islando, Italio, Jugoslavio, Kolombio, Novogio, Pollando, Svedio kaj Svislando.

A.- Por iom varii ĉijare ni ne respondos al la alvenintaj korespondaĵoj laŭ la afabeta ordo de la devenaj landoj, sed laŭ la temoj, kiujn ili pritraktas. Tio donos al ni la eblecon reveni al fakoj prezentitaj dum tiu ĉi jaro, alportante novajn sciigojn aŭ malfermante diskutojn.

Cl.- Ni havas kelkajn geaŭdantojn, kiuj regule esprimas perletere sian opinion pri niaj diritaĵoj. Pro nia ĉijara konversaci-plano, vi tiel havos la okazon plurfoje aŭdi iliajn nomojn. Ili fariĝis por ni intimaj amikoj, kies penson ni pli kaj pli bone konas. Tutcerte ankaŭ ili havas reciprokajn sentojn. Nin aŭskultante semajnon post semajno esprimi originalajn vidpunktojn pri temoj en rilato kun la internacia vivo kaj esperanto, ili bone konas nian penson kaj interesiĝas pri nia kompleksa kaj multflanka aktiveco.

A.- Jen ni listigas la temojn, kiujn ni tuŝos dum nia ĉijara babilado kun niaj geaŭdantoj. Ni reparolos pri la interlingvistika dokumentejo CDELI de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds, kies arkivisto estas mia edzo, kaj pri Kultura Centro Esperantista, kiu ĵus instaliĝis en la sama urbo, kaj kies sekretario estas mia edzo. Pluraj geaŭdantoj esprimis sian intereson por la aktiveco de tiuj du centroj. Montriĝas tamen necese bone distingi iliajn karakterizaĵojn.

Cl.- Poste ni tuŝos la temojn migrado de esperantistoj en la svisa montaro, mondanismo, la nuna lingvo-evoluo de la mondo. Ni poste mencias kelkajn lingvajn demandojn en rilato kun esperanto. Kaj ni konkludos nian babiladon malfermante ĝeneralan diskuton pri variaj temoj, kiuj respegulas la vidpunktojn kaj interesojn de la skribintoj.

A.- Jen sufiĉe plaĉa programo por la finjaraj semajnoj. Ĝi tutcerte retenos vian atenton kaj iel instigos vin skribi al ni ne timante esprimi foje eĉ tre personajn vidpunktojn.

Cl.- Hodiaŭ ni komencos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj salutante ...

A.- ...

(... Mankas la sekvo ...)